Prezo: 7 €
www.satesperanto.org
Marto-Aprilo 2015 | n-ro 3–4 (1317-1318)

# Sennaciulo

Oficiala organo de SAT




SAT-anoj kutimiĝu al eksternacia sent-, pens- kaj agadkapablo!



Printempas re (paĝo 32)



Kio estas konscio? (paĝo 10)



Ĉu sklavoj vivas daŭre en Maŭritanio? (paĝo 20)



Predobulo el skombroj (paĝo 18)

# ✍ REDAKTANGULO ✍

Karaj legantoj,

Jen la marto-aprila numero de *Sennaciulo*, ĉifoje kun abunde nutrata temdosiero pri scienco. La kovrilbildon, la enkondukon kaj la ordigon de la dosiero prizorgis freŝe aliĝintaj kamaradoj. Jen esperеble inspirodona ekzemplo por ĉiuj lastatempe alvenintaj novuloj, kiuj ankoraŭ serĉas kiamaniere kontribui al la vivo de SAT.

La listo pri venontaj temdosieroj elĉerpiĝis. Fakte, ja venis kelkaj ideoj, sed propono pri temo sen kunordiganto ne vere estas efektivigebla. Dosier-kunordiganto estas iu, kiu pretas instigi aliajn al verkado pri la temo, ordigi la ricevitajn kontribuojn, kaj se eble verki enkondukon kaj sugesti kovrilbildon. Pri lingva kontrolo kaj teĥnika prilaborado de la ricevitaj tekstoj zorgas la kutimaj anoj de la redaktoskipo.

Se iun temon vi tre deziras vidi traktita en *Sennaciulo*, pensu ankaŭ proponi vin por tiu ĉi kunordiga tasko, aŭ malfermu la SAT-adresaron por trovi kuraĝulon, kiun vi sukcesos varbi al la laboro.

En tiu ĉi numero aperas unua listo de aliĝintoj por la SAT-Kongreso en Nitro. Se vi ne estas inter ili, kaj hezitas pro financaj kialoj, ne forgesu ke la kongresa helpo-fonduso estas je la dispono de ĉiuj SAT-anoj por faciligi ĉies aktivan partoprenon en la asocia vivo.

Agrablan kaj verko-stimulan legadon deziras al vi

la redaktoskipo.

# *Venontaj temdosieroj*

Venontaj temdosieroj

Novaj situacioj ĉe politikaj partioj

En preparo - kontribuoj jam ricevitaj

Limdato por sendo de artikoloj por Sennacieca Revuo 2016 estas la 31a de decembro 2015.

**Eraroj en la sendolisto por la januara-februara Sennaciulo**

Anstataŭ la provizita dokumento, la presisto uzis por la sendo de la januara-februara numero de Sennaciulo la malnovan sendoliston de la novembro-decembra numero. Rezulte, la informoj pri stato de kotizrepagoj sur la sendofolio respegulas la tiaman situacion. La numero estis aparte resendita al la novaliĝintoj. Kaze ke vi nenion ricevis, eblas peti ĝin denove ĉu per skribo al la SAT-sidejo (vidu p. 38), ĉu per sendo de retmesaĝo al <guyves.cavalier@gmail.com>.

# *Enhavo*

Enhavo


## TEMDOSIERO "SCIENCO"
4 Enkonduko GUILLEM GÓMEZ BLANCH
5 Kio estas scienco? ANDREO HOARO
6 Nova klerismo kaj toleremo RENATO CORSETTI
Skeptikismo kaj kritika pensado TOÑO DEL BARRIO
8 Kio estas la zetetiko? NELLY DARBOIS
Materiismo, relativeco, kvantuma meĥaniko GUILLEM GÓMEZ BLANCH
10 Kio estas konscio? CEZAR
12 La suna flanko de l' parolado SEBASTIAN HERRMANN
Albrecht de Graefe RENATE FEYL
14 Scienco de libera spirito R. SCHNELLER
16 Forpasis Stevens T. Norvell (1923-2015)
Lime de Francio kaj Svisio: CERN laboratorio pri FIZIKO JOCELYNE MONNERET
18 La ŝparita bovino CEZAR
Predobulo el skombroj CEZAR
19 Glacimonto kvazaŭ kantanta sonas kiel grandega gongo CEZAR

## SOCIO
20 Ĉu sklavoj vivas daŭre en Maŭritanio? MIR-KO
23 La Demokrata Konfederaciismo: alproksimiĝo je la kurda konflikto NIKOLAS XIL CARVALHO
26 Bakunin: naciismo, ŝtato kaj religio JULIO REYERO

## AGROEKOLOGIO KAJ KLIMATO
28 La kamparana agroekologio, ŝlosilo por la homaro kaj la planedo ROBIN' BETO

## INTELEKTA MEMDEFENDO
29 El la iloskatol' de l' intelekta memdefendanto ANDREO HOARO
Solvoj de la cerbumigoj de l' n-ro Januaro-Februaro 2015
Novaj cerbumigoj DIANA RIŜAR

## BELETRA ANGULO
30 Tiaj ni estas! ROGER CONDON
31 Tegmenta Luko MARÍA ÁNGELES MAESO
32 Formikoj
Printempas Re

## LIBERECANA FRAKCIO
33 Memorindaj anarkiistoj kaj anarkiisma esperantismo MIGUEL FERNÁNDEZ

## TRA ESPERANTIO
35 Kastelo Greziljono estas fama franca Esperanto-Kulturdomo. Kio plia? BERT SCHUMANN

## EL LA SAT-ADMINISTREJO
36 Novaliĝoj
Aŭstralio funebras FRANCISKA TOUBALE
37 Listo de kongresaj aliĝintoj
38 Landaj Perantoj | Kotizoj | Praktikaj informoj

## SAT-ANOJ AKTIVAS
39 Korea kamarado salutis en Sapporo, Japanio


*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn ni ne resendas. Kontribuojn sendu al:*
***sennaciulo.redaktejo@gmail.com***